# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
5, nr. 1 jan. 1985
JAARGANG

ATENTINDAĴOJ

Venonta estrarkunsido : 02 02 1985 en Esperantodomo, Antverpeno

Semajno de Internacia Amikeco : 17 02 12 en Leuven

- temo : Enkonduki komencantojn en la movado.

  Info : ESPERANTO 2000 - tel 016/20 14 53
  aŭ Françoise GULDENTOPS
  De Coster-straat 12
  2990 WESPELAAR

GAZETARA SERVO

Ne forgesu sendi regule viajn kontribuaĵojn al la gazetara servo, p/a Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert.

Adres-ŝanĝo : Kiky TYTGAT nuntempe loĝas : Cellebroedersstraat 20
2000 ANTWERPEN tel. 03/232 74 45

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00
Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto : | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj : | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado : | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Intergrupa agado : | Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Junularo : | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kadrokursoj : | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Literaturo/eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Gazetara servo : | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Sciencoj : | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

Provincaj respondeculoj :

| | | |
|---|---|---|
| Brabanto : | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166, 2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| Limburgo : | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| Okc. Flandrujo : | vakas | |

---



Letero de la Prezidanto

Karaj Geamikoj,

La jaro 1984 estis prospera por FEL.

La membronombro kreskis per preskaŭ unu kvarono. Kvankam ni ne havis enspezon pro la Universala Kongreso (kiel 1983), ankaŭ la financa rezulto esos pozitiva. Pro la kampanjo "Test 5000", pli ol 400 homoj ekstudis nian lingvon. Esperanto atingis du gravajn rekonojn en nia lando pro ĝia rolo en la 7-a Mondkongreso pri Aplika Lingvostiko kaj pro la oficiala permeso por organizi Esperanto-kurson en la universitato de Bruselo.

Ĉio tio estis realigebla pro vigla kunlaboro inter la estraro, la Esperanto-Centro kaj la grupgvidantoj. La Centro pli kaj pli havigis al ni ciferojn pri membronombroj, pri la konsisto de la membraro, pri la financaj rezultoj de nia agado ktp. Tio permesas tuj prijuĝi kaj adapti kampanjojn ktp.

La grup- kaj kursgvidantoj entreprenis komunajn pensekzercojn : kolokvon kaj ideopluvigon. Sed por konsciiĝi kio vivas inter la kursanoj kaj membroj, ni daŭre bezonas la kritikojn, sugestojn kaj proponojn de la lokaj agantoj.

Mia plej arda deziro estas, ke la rilatoj kun la grupoj fariĝu ankoraŭ pli intimaj en 1985. Tiamaniere ni preparas eĉ pli prosperan finrezulton.

Via prezidanto,

Ivo Durwael.

---

Jen deziroj de la tuta estraro :

| | |
|---|---|
| 365 schone dagen | 365 belegaj tagoj |
| Vrij van kommer en plagen | Liberaj de zorgoj kaj plagoj |
| Niet te warm, niet te koud | Nek malvarmaj, nek tro varmaj |
| Vol van vreugden menigvoud | De ĝoj' multobla plen-svarmaj |
| Werk na rust | Post ripozo da labor' |
| en verder, al wat 't hertje lust | kaj ĉio deziranta via kor'. |
| Stijn Streuvels | JB. |

---

# P R O T O K O L O

pri la estrar-kunsido de sabato 5-a de januaro 1985 en Antverpeno.

Ĉeestantoj : Erik D'HONDT (ED), Ivo DURWAEL (ID), Paul PEERAERTS (PP),
Edward SYMOENS (ES), Kiki TYTGAT (KT), Hilde VAN INGELGEM (HVI)
Jules VERSTRAETEN (JV) kaj Jan BOVENDEERD (JB)

Prezidas : ID
Protokolas : JB

Komenco : 14.15 h.

---

1. Televida programo

La 22-an de januaro 1985 je 21.10 h., la Belga Televido BRT-2 elsendos programon pri Esperanto kadre de la "Steek er wat van op show".
Intervjuotoj : Gregoire Maertens kaj Kiky Tytgat.

KT antaŭmetas la demandaron kiujn ŝi ricevis kaj petas konsilojn por la respondoj. Komprenebie, la veraj respondoj aŭ ilia amplekso dependos de la disponigota tempo.

2. Institucio Hodler 68

Ni ricevis kopion de longega letero de Gregoire Maertens al la estraranoj de Institucio Hodler rilate al la de FEL kaj LVS proponita amendumo al la lu-kontraktoj.
Ni nun atendu la reagojn de IH.

3. Aprobo de la protokolo pri la estrarkunsido de 08 12 1984.

La protokolo estas aprobita kun jena korekto:
En punkto 8.1, 2-a alineo, bonvole legu anstataŭ 150-a,"125-a" datreveno de la naskiĝo de L.L. ZAMENHOF.

4. Gazetara Servo

4.1. Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert estos en Antverpeno, ĉu la 12-an, ĉu la 19-an de januaro. Ili petis kunsidon tiu-okaze kun kelkaj estraranoj.
ID kaj ES proponos la 19-an je 14.30 h. en la Esperantodomo.

4.2. PP konstatis ke diversaj personoj okupiĝantaj pri gazetaraj aferoj, petas alsendon de kontribuaĵoj. Li sin demandas kion oni ĝuste decidis, ĉar tiu-ĉi maniere tio nur ĝenas la bonan ordon de la Gazetara Servo. Por FEL ekzistu nur unu adreso : Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert, Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE.



4.3. ES atentigas pri la laboro farita de Germain Pirlot.
ID opinias ke ni ankoraŭ ne atingis la nivelon de GP. Ĉi tiu nome ricevas ĉiujn kontribuaĵojn, kribras ilin, metas ilin en la bonan direkton kaj poste dissendas la rezultatojn al la diversaj kunlaborantoj.

4.4. ID ankaŭ jam konstatis ke certaj gazetoj regule aperigas artikoletojn kiuj ne devenas de nia gazetara servo kaj neniam parolas pri Esperanto en Flandrio.
Normale ankaŭ ni devas povi fari same, kaj regule sendi sciigojn ankaŭ al tiuj specifaj gazetoj.
Konkretaj proponoj estas atendataj.

4.5. Speciala peto tuja estas nome rapida reago al la elsendo de BRT-2 je 22 01 1985.

5. Enketoj

ID verkis leteron por Ĉeĥoslavia Esperanto-Asocio cele al interŝanĝo de spertoj rilate al la enketoj pri kiuj temis i.a. en nia kolokvo en Aalst.
JB zorgos pri la forsendo.

6. Gratuloj k.s.

Je 24 01 1985, Cesar Vanbiervliet estos 80-jara.
Pro liaj multaj meritoj en la Esperanto-kampo, FEL sendos gratul-leteron kaj planas pli ampleksan gratulado okaze de la ĝenerala jarkunsido en marto.

La Flandra Esperanto-verkisto, Frans Van Dooren 80-jariĝos je 15 04 1985.
Ankaŭ pri tio temos en la ĝenerala jarkunsido en marto.

7. Administrado - korespondado.

JB anoncas ke li ankoraŭ ne skribis al EPĈ por sciigi al ili, ke FEL peros ilian revuon ekde 1985.
Li urĝe plenumos tiun taskon.

8. Ĝenerala Jarkunsido

Laŭ peto de ID, ni klopodos pliagrabligi kaj pli vigligi la ĝeneralan jarkunsidon, por ke ĝi ne limiĝu al serio de - precipe tedaj - raportadoj.

8.1. Ĉiu grupo disponos pri ± 5 minutoj por raporti pri speciala entrepreno, jes aŭ ne sukcesa, sekvota de eblaj demandoj.
Por tio ni antaŭvidas proksimume 1 horon.

8.2. Sekvos la kasraporto (± 1/2 horo) kaj morala raporto (± 1/2 horo)

8.3. poste la solenaĵoj

8.4. post la solenaĵoj la diversaj raportoj de i.a.

- Intergrupa agado
- FLEJA
- Gazetara Servo
- Kadrokursoj kaj Jubilea Jaro
- Eksteraj rilatoj
- Scienco (komisiono pri -)
- BEFA
-
-

8.5. Eksigo de la estraro

8.6. (Re)elekto de nova estraro

8.7. Instalado de la nova estraro

8.8. Fina vorto de la prezidanto

8.9. Post la ĝenerala jarkunsido ni okazigos agrablan kunestadon en formo de komuna manĝo kaj ...

Tamen, por povi ĝustatempe akiri la necesajn aĵojn por la preparado de la manĝo, antaŭmendo estos necesa ĝis laste 15-a de marto 1985.

Partopreno en la kostoj : BF 200,-

9. ES raportas ke la ministerio pri Kulturo proponis partoprenon en inform-programo en Kastelo de Ham, Steenokkerzeel.

10. FEL-servoj

En ESPERANTO PANORAMA ĉiu povis legi pri la FEL-aranĝo rilate al kunaj vojaĝ-eblecoj laŭ la ekzemplo de "TAXI STOP". Ni nun ne eniros detalojn, sed jes alvokas al serĉadokun de taŭga traduko de la titolo "Zeg hé, rij je mee ? "

Kiu kunhelpos ?

Proponoj estas atendataj ĉe la serkretario.

11. Libro-servo - aŭkcio (brokantaĵoj)

JB trovis en la Sveda revuo LA ESPERO ekzemplon de libro-aŭkcio-koresponda Publikigata estas listo de interesaj verkoj (brokantaj) al kiu interesitoj respondu per letere tuj indikante la de ili proponitan aĉetsumon.
Poste la libroj estas senditaj al la plej interesaj sum-proponintoj.
Tiamaniere SEA jam enspezis interesajn sumojn por siaj laborkostoj.

Ni povus fari same, kondiĉe kompreneble, ke ni disponu pri interesaj verkoj.

La afero estos priesplorata.



12. Jubilea Jaro

André Staes havas interesan proponon, nome, alumetskatoletojn, fakte fald-skatoletojn kun Esperanto-reklam-teksto. Tiaj alumetujetoj estas malmultekoste akireblaj en Orient-Eŭropaj landoj.
La propono estos antaŭmetita al Klubo 100.

13. Mondonacoj

HVI demandas ĉu mondonacoj al Eŭropa Esperanto-Centro estas eblaj pere de FEL, por povi profiti de la imposta redukto.

Jes. Ni cetere ankaŭ tion jam faras por Klubo 100.

14. Rompŝtelo - asekuro.

En la Kristnaka nokto okazis rompŝtelo en Esperantodomo. Krom mono, oni ŝtelis ankaŭ personajn aferojn de i.a. PP.
Nia asekurkontrakto ne kovras tion.
JB raportas ke, je la kontraktado, ni ne asekurigis la sekvojn de romp-ŝtelado, ĉar la tiurilata premiumo estas tro alta.
PP informiĝos ĉe UEA, ĉu tie eble ekzistas tia asekur-kontrakto.

15. Ŝtatgazeto

Laŭ PP la nova estraro ankoraŭ ne aperis en la ŝtatgazeto.
JB esploros kaj se necese, sendos memorigan leteron.

16. ES raportas ke :

16.1. en universitata revuo aperis ampleksa artikolo pri Esperanto.

16.2. ILEI sendis rezolucion por tradukado nacilingven, cele al agado ĉe la ministerioj pri edukado por enkonduki Esperanton en la lernejojn. ES, opiniante ke la momento ne taŭgas, respondis al ILEI ke ni ne kun-agadas en tio.

16.3. "Cités Unies" publikigis artikolon malfavoran al Esperanto. Es protestis. En artikolo "La vérité sur l'Esperanto", "Cités Unies" korektis sin, dirante : " Nous nous sommes trompés ..."

16.4. PP sin demandas ĉu en la Brusela universitato VUB, kie do okazos Esperanto kurso ekde oktobro 1985, ekzistas kerno de Esperantistoj inter la studentoj.
Laŭ ES temas pri kurso en la Instituto pri lingvoinsturado (Instituut voor Taalonderwijs).

17.1. ESPERANTO 2000 intencas malfermi la Semajnon de Internacia Amikeco je 17 02 1985 en Leuven en formo de prelegaro k.s. pri "Kiel enkonduki

komencantojn en la Esperantomovadon" kaj Kiun strategion sekvi".

La grupestroj estas insiste petataj sendi kiel eble plej baldaŭ liston de siaj kursanoj.

17.2. ID opinias oportuna okazigi matene kolokvon pri : "Kiel gvidantoj povas plibonigi la simplajn rilatojn kun la mebroj".

18. Rilate al la enketo en la grupoj pri la ne-realiĝintaj membroj, mankas ankoraŭ la informoj de la grupoj el Bruĝo (ambaŭ), Bruselo, Hasselt, Kortrijk kaj Leuven.
HVI pluatentos pri tio.

19. Kolokvoj

La tekstoj de la du pasintaj kolokvoj estas pretaj kaj haveblaj de ĉiu interesito je simpla demando al Esperanto-Centro

Fino de la kunsido : 17.35 h.

JB

---------------------